Zevende Jaargang, Nummer 2 Verschijnt vierwekelijks 9 Februari 1935

# LABORISTA ESPERANTISTO
ARBEIDER ESPERANTIST

ORGAAN VAN DE FEDERATIE VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

Redactie: Middenweg 226, Amsterdam-O. || Secretariaat en Administratie van de Fed. van Arbeiders-Esperantisten: Postbus W 6, Amsterdam-W. || Postgiro Amsterdam No. 144698. Gem. Giro A'dam F 930 || In België: Esschenstraat 16, Antwerpen

Abonnementsprijs f 0,75 per jaar. Voor leden gratis. Oplaag 4700 exemplaren.

## DANK ALLER TOEGEWIJDE KRACHT.

Voor hen die nog niet zo ver zijn, dat zij onze jaarverslagen, die steeds in 't esperanto verschijnen, zouden wij deze willen vertalen met één volzin: Wat moeizaam werken vermag.

Vergelijken wij onze Federatie met andere organisaties, dan mogen we zeggen, dat ze de vergelijking in vele opzichten glansrijk kan doorstaan.

In deze, voor ons, arbeiders, zo zwarte tijd, mag een organisatie met genoegen terugzien op een jaar dat een flinke ledenaanwas bracht. Een groei van 566 leden voor een organisatie als de onze mag er zijn, vooral als men weet, dat ook in voorgaande jaren het ledental omhoog ging. En versterking van het ledental betekent versterking van onze positie, van grotere verbreiding van het Esperanto.

Bijna 100 afdelingen, een aantal plaatselijke en provinciale districten zorgen voor een organisatorische kern, bezield met de vaste wil om het esperanto in het middelpunt der belangstelling te brengen, zodat de arbeidersbeweging er toe komen moet, al datgene te doen wat mogelijk is, om esperanto als internationale verkeerstaal te doen inburgeren. Zo lang dat niet het geval is, dienen wij de verbreiding te bevorderen, op de wijze voor ons steeds meer gebruikelijk.

Buiten de propaganda, die door ons steeds meer grootscheeps wordt opgevat, dienen daartoe onze cursussen. Geen esperantovereniging is er die zó veel cursussen organiseerde als wij. Was dit aantal het vorig jaar 151, nu waren het er 183 met 4350 deelnemers. Een schaar van cursusleiders is daarvoor in touw. De buitenstaanders moeten zich eens indenken wat dat betekent, want het zijn cursussen in een vreemde taal, meestal voor hen, die nooit enige, ternauwernood hun eigen taal leerden. Ons orgaan heeft nu een oplaag van 4700 ex., waarop geen esp.-organisatie kan bogen. Onze leden ontvangen een werkelijk internationaal orgaan bovendien, wat bij geen enkele organisatie van welke aard ook, en hoe groot die ook zij, mogelijk is. Omdat alleen wij een taal kennen die inderdaad overal op aarde wordt gebruikt.

Aan de uitbreiding der esperantokennis wordt gewerkt opdat wij bekwaam voor onze taak, de beweging ook internationaal kunnen dienen. Door de uitgave van een studieorgaan en studieboeken en de verkoop van esperanto-werken in eigen hand te hebben genomen, wordt aan de meerzijdige ontwikkeling der onzen gewerkt.

Financiëel komen we, vooral dank zij onze boekendienst, die voor vele duizenden guldens omzette, er steeds beter voor te staan, hetgeen de propaganda-mogelijkheden allengs vergroot. En over eens- en goedwillende krachten hebben we niet meer te klagen.


Onze Federatie, hoe groot ze ook nu al is en wat ze al doet, wordt geleid in het gehele taalgebied van afd.-bestuur tot Fed.-bestuur door met werklust bezielde krachten, die allen werken aan de grootmaking onzer beweging. Dat mogen we nog eens in het licht stellen, om dan te concluderen, dat door aller toegewijde kracht, onze Federatie voor de dag kan komen. Daartoe te behoren zij alle lezers tot eer.

## LA URBO DE NIA KONGRESO.

La kongreso de FLE okazos en Groningen. Groningen, malgranda urbo en la norda parto de Nederlando regiono, kie la Esperanto-movado, precipe la laborista-esperantomovado ankoraŭ malforte vivas.

Tial okazos la kongreso ĝuste en Groningen. Nia kongreso, grava okazontaĵo en la movado estu grandioza.

Tial multaj gekamaradoj vizitu ĝin por ke la Esperantaj sonoj fortege regu en nia urbo.


La konata Martini-turo.

Do ĉiuj al Groningen.

Ĉiuj al nia kongreso por fortigi nian kamaradecon, por kreskigi nian movadon, por doni al la tuta mondo la pruvon, ke Esperanto vivas!

Kaptu la okazon por nemultekosta vizito al malnova agrabla urbo.

Aranĝu la vojaĝon tiel, ke vi jam sabaton antaŭ Pasko alvenos, por ĝui la vidindaĵojn kaj ĉeesti la renkontiĝvesperon en kamaradecplena rondo.

Ni atendas vin.

# RAPORTO PRI LA FEDERACIO EN LA JARO 1934.

**ENKONDUKO.**

Finiĝis jaro kaj laŭkutime ni en la memoro rerigardas la periodon, kiu estas post ni. Kvazaŭ haltejo, kie oni dumtempe haltas por kontroli.

La nuntempa periodo grave diferencigas sin, ĝi ne estas ordinara periodo de seninterrompa glata evoluado. En la mondo brulas ne-ĝuste distingebla fajro de interpuŝiĝoj inter malnovaj, ne plu taŭgaj sistemoj de la ekonomia aranĝo, kaj la klopodoj de parto el la homaro, kiu suferas pro ĉi ĉio kaj inklinas al apliko de novaj necesaj sistemoj, pri kies efikoj oni tamen havas inter si malajn opiniojn.

La laboristaro en la tuta mondo aktive partoprenas en ĝi kaj pli kaj pli klopodas deĵeti de si la premon, kiu tenas ĝin en baraktoj por vivteni sin. Aliflanke la posedanta klaso kontraŭstaras ĉiel agnoskon de pli homaj moraloj kaj konsideras tion „malfavora kaj danĝera". Sub diversaj maskoj sin prezentas la pretekstantoj por savi la naciojn.

„Pro krizo", milionoj da homoj malsatas, dum nutraĵoj abundas; milionoj da homoj suferas en mizero dum oni interdisputas kiel ŝanĝi tion. La „krizo" furiozas en ĉiuj partoj de la mondo. Vanaj estas la ĉiuspecaj teorioj kaj „antaŭdiroj", ŝanĝetoj restadas favoraj kaj malfavoraj, sed la krizo pelas senkompate la laboristaron, la proletaron en la faŭkon de senlaboreco. Nacia ondo vagas tra la mondo, ondo kiu endanĝerigas la mondon pro dissplitiĝo kaj interpuŝiĝoj. Milito terura, hombuĉado svebas minace inter la homaro.

Inter ĉi cio estas nia eta, juna, ankoraŭ malforta movado, batalante energie por sia disvastiĝo. Ĝi estas parto el la tutmonda esperantista radaro. En ĝi kuŝas la nova vivokapablo de sennacieca, tutmonda laboristaro, sendube grava por la estonta evoluado. Ĝi kreskas sub tre malfacilaj cirkonstancoj. Sed ni, esperantistaj laboristoj sentas, pli bone konvinkiĝas pro nia batalo, ke ĝi servos kiel eduka kaj kuniga ilo en nia batalo. Kompare kun la naciema ondo, ĝi ŝajne nun estas sensignifa, sed tamen ni estas konvinkitaj, ke ĝi iam anstataŭigos tiun nacieman ondon per sia plialtvalora signifo de sennacieca evoluado.

Tio unue trafas nin, kiam ni nun, ĉe la fino de la jaro, rerigardas.

**KRESKO DE LA FEDERACIO.**

Nia Federacio en la pasinta jaro streĉis siajn povojn, kio ne restis senfrukta. Dum oni ĉie kaj en preskaŭ ĉiuj organizoj povas konstati malkreskon, nia Federacio kreskis seninterrompe. Ni estas konvinkitaj, ke se la nuna krizo ne tiom malhelpis nin, la Federacio montris sendube pli altan nombron da anoj; la fruktoj de la propagando certe estus pli kontentiga do sekve nia organizo estus pli forta. Sed ni ankaŭ estas konvinkitaj, ke precipe en la bataloj kontraŭ la malhelpoj edukiĝas niaj laborantoj, la kerno el niaj anoj estas forta. Ni scias ankaŭ, ke precipe en niaj vicoj oni povas trovi tiom da laboremo, tiom da energio, tiom da sindono, ĉar ni estas konvinkitaj pri la valoro de nia movado por la laborista klaso precipe kaj por la homaro ĝenerale. Kun peno la adeptoj de nia mondlingva movado estas kolektitaj. Ili homo post homo, kamarado post kamarado kaj kamaradino post kamaradino devis kapabligi sin por aliĝi al la Federacio kaj aliĝinte al ĝi, oni bone komprenas, ke nia movado postulas multon, multe da energio, multe da sindono, multe da tempo kaj multe da laboro. Ne estas mona gajno nek komercaj konsideroj, kiuj igas ilin resti en nia Federacio kaj labori por ĝi, sed estas la kompreno pri la valoro de nia mondlingvo kaj idealismo, kiuj arigas ilin en niajn vicojn. Ni scias kaj konstatas, ke multaj, kiuj tamen devus esti en niaj vicoj restas ankoraŭ malproksimaj de ĝi.

**Novaj sekcioj fondiĝis en:** Amsterdam (VI); Vierpolders, Wormer, Vlaardingen, Oostzaan, Bilthoven, Stompetoren, Westzaan, Beemster, Edam, Deventer, Boskoop, Krimpen aan de Lek, Rotterdam (IX), Schermerhorn, Aalsmeer, Merksem, Nieuwerkerk aan de IJssel kaj Assendelft.

Bedaŭrinde aliflanke ni devas mencii la malfondiĝon de la sekcioj Amsterdam VI (malnova sekcio faka-anarkia, poste aliĝis nova faka grupo de transportlaboristoj, kiu sekcio do okupis la vakantan lokon); Enkhuizen kaj Wieringen. Tamen en la koncernaj lokoj ankoraŭ nun estas ĝeneralaj membroj, kiuj kun la helpo de la Nord-Holanda distrikto klopodas restarigi la sekciojn. En Enkhuizen nun funkcias kurso dum en Wieringen oni ree havas kontakton kaj eklaboris.

Ni decidis eksigi sekcion Ostende pro kotizŝuldo. La motivojn por tiu eksigo ni menciis en LE de Oktobro 1934.

En la jaro 1933 la nombro de niaj sekcioj atingis la ciferon 81, en la jaro 1934 tiu nombro altiĝis per 19 novaj sekcioj, 3 sekcioj malfondiĝis, kaj 1 estis eksigita, sekve la Fed. havas nun **96 sekciojn.**

**MEMBRO-NOMBRO.**

La nombro de niaj anoj en la sekcioj kreskis per 565 ĝis **2758,**
de la ĝeneralaj anoj per 3 ĝis 85,
simpatiantaj membroj malkreskis per 8 ĝis 18 kaj la simpatiantaj organizoj kreskis per 6 ĝis 26.
**Entute do la membronombro kreskis per 566 ĝis 2887 anoj.**
Por komparo sekvas jenaj ciferoj:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Fine de | 1934 | la membronombro | estas | 2887 |
| „ „ | 1933 | „ „ | estis | 2321 |
| „ „ | 1932 | „ „ | „ | 1965 |
| „ „ | 1931 | „ „ | „ | 1561 |
| „ „ | 1930 | „ „ | „ | 1133 |
| „ „ | 1929 | „ „ | „ | 450 |
| „ „ | 1928 | „ „ | „ | 166 |
| „ „ | 1927 | „ „ | „ | 75 |

En 7 jaroj la Federacio do kreskis de 75 anoj al organizo kun 2887 anoj. Kiam ni do komparas ĉi ciferojn, okulfrape trafas nin la regula kresko. Ni scias, ke la sorto ne maltrafis en tiu periodo ankaŭ nian federacion, ke ni devis streĉi niajn fortojn por kontraŭstari la minacojn kaj malhelpojn.

Sufiĉe grava nombro en tiu periodo forlasis nin, lasante pro tio la laboron al la plipersistemaj ĝekdoj. Spite ĉi ĉion la federacio nekontraŭdireble fariĝis la plej agema, grava kaj plej forta lingvoregiona esperantisto-organizo. Ni trovas en tiu kresko firman bazon por estonta laboro. La komparo instruas nin, ke en la kadro de nia organizo oni povas trovi la plej efikan aplikadon de laboroj, favore al la disvastiĝo de esperanto inter la laboristaro.

**LA FEDERACIA KONSILANTARO.**

La Federacia Konsilantaro kunvenis en ĉi tiu jaro du fojojn. Per ĝi ni havigis al ni konkretan kontakton kun la tuta lingvoregiono.

Malgraŭ, ke ni ne povas ne konfesi kelkloke, ke ni spite ĉiajn klopodojn ne jam akiris la deziratan rezulton, la federacia konsilantaro tamen ebligis al ni prikonsideri tiujn faktojn, la melhelpojn kaj la rimedojn por klopodi aliiĝi tion.

En la kunvenoj estis pridiskutitaj la plej aktualaj problemoj de nia organizo kaj apud la ĝeneralaj gvidaj demandoj por la organizo, ni havis okazon pristudi la laŭregionan situacion rilate al la disvastiĝo de nia movado, propagandaj problemoj kaj ĉiuj ceteraj konsideroj, kiuj en la kadro de nia organizo sin prezentas.

La kunvenoj estis sukcesaj kaj escepte 1 distrikton (Brabant en Belgio), ĉiuj distriktoj estis reprezentitaj.

**LA PROVINCAJ DISTRIKTOJ.**

En la mallonga tempo, ke la distriktoj funkcias (2 jarojn) pli kaj pli montriĝas, kian regulan kontakton ni havigis al ni per la starigo de ĉi tiu aparato; regula kontakto, kiu etendas siajn fadenojn ĝis la plej malproksimaj lokoj de nia lingvoregiono.

La plej fortaj distriktoj montras, ke ili plenumas necesan taskon per kiu eblas efike kaj fruktedone propagandi kaj agadi por nia federacio. Estas kompreneble, ke la plej malfortaj distriktoj fakte ankoraŭ ne tiel povas plenumi tiun taskon kaj ofte ili ne povas fari tion, kion ili deziras pro manko da kunlaborantoj, pro manko da mono kaj pro manko da sperto kaj spertaj gekdoj.

Tamen ni devas samtempe konstati, ke sen la distriktoj ne eblis atingi tiom, kiom en la pasinta periodo en lokoj, kiuj estas atingeblaj nur per penigaj aranĝoj kaj ofte post multaj klopodoj. Kelkaj distriktoj estis devigitaj ĉesigi siajn klopodojn en lokoj malproksimaj, ĉar ili ne povis akcepti la konsekvencojn. Sed ili jam estas certaj, ke en la proksima sezono ili sukcesplene povos operacii tie la pacienton.

Kelkajn distriktojn la fed. kaso subtenis finance kaj per senpaga propaganda materialo. Precipe tio estis destinita por la propagando, sed ankaŭ por certigi la financan bazon de la distrikto, koncerne plenumon de ĝia tasko, nia fed. kaso helpis laŭpove. Ĉiu distrikto estas parto el la fed. aparato, ĝi reprezentas la federacion kaj laboras por plivastigi en sia regiono nian movadon. En daŭra kaj rekta kontakto kun la Fed.-estraro, sukceso rezultas el tio. Konsekvence ĉiu el niaj anoj komprenu sian valoron por tio kaj kunhelpu laŭpove kaj konkrete. La distriktoj bezonas kunhelpantojn en ĉiu angulo de sia regiono. Ĉiu alportu sian ŝtoneton kaj ne malatentu tion, opiniante, ke tia valora aparato povus havi sukceson per pasiva sinteno de la anoj. Multaj jam komprenis tion, sed sendube ni havos pli da sukceso, kiam ankaŭ la pasiva intereso sanĝiĝu en aktivan.

La distriktoj estas konsistigataj de la sekcioj kaj havas apartan estraron. Ni atentu, ke tiu estraro mem nenion povus entrepreni sen la helpo de la sekcianoj. Montriĝis, ke ĝenerale oni komprenas tion, sed necesas, ke ĉiu konsciu pri tio.

**NIAJ KURSOJ.**

En la raporto pri la jaro 1933 vi trovis aludon pri la gravo de la kursoj por nia movado. Komparante la ciferojn oni povas konstati eventualan progreson.

Tial ni donu jenajn ciferojn komparcele: (laŭ ricevitaj nekompletaj informoj por la statistiko).

| | 1933 | 1934 |
|---|---|---|
| Ekspozicioj ...... | 50 | 73 |
| Prop.-kunvenoj .. | 12 | 33 |
| Nombro da kursoj | 151 | 183 |
| Nombro da kursanoj .......... | 3400 | 4350 |
| Daŭrigaj kursoj .. | 25 | 64 |
| Infankursoj ...... | 10 | 23 |

Bedaŭrinde ni devas aldoni, ke ĉi ciferoj estas nekompletaj. Same kiel en la antaŭa jaro nin ne atingis la informoj de kelkaj sekcioj. La ciferoj do atestas pri la al ni konataj informoj. La ĝustaj ciferoj do estas pli altaj.
Estas grava paŝo antaŭen, ke la kursoj por komencantoj plimultiĝis per 32 ĝis 183 kaj la nombro de la „komencantaj" kursanoj plialtiĝis de 3400 ĝis 4350, do per preskaŭ 1000.
Ankaŭ la nombroj de la daŭrigaj kursoj kaj de la porinfanaj kursoj grave multiĝis.
Sendube ĉi ĉio donos al nia movado fruktojn, sed por rikolti necesas laboremo kaj helpantoj. Ne nur necesas laboremo sed precipe kunhelpo en la kadro de la organizo.
Okazas kelkloke, ke oni ne atentas tion kaj per propraj aranĝoj (cetere kun bonaj intencoj) klopodas rikolte konservi la fruktojn. Oni tamen komprenu, ke ni laboras sur propra tereno kaj ke la forto troviĝas en nia organizado. Ni ne ĉirkaŭvagu, sed konsciu pri ĉi ĉio.
La novaliĝintoj trovu ĉe ni konkretan organizformon, kiu donos certon pri karaktero kaj tendenco de nia movado.
Tial ni ebligis al niaj kursanoj, ke ili je favora abonprezo povis aboni nian organon „Laborista Esperantisto"n, tiel informante ilin pri nia organizo. Sendube tio donas profiton al la legantoj kaj al la kursgvidantoj.
La kursoj estas plejgrandparte laŭ gramatika bazo (lerno-libro) sed ankaŭ estas kursoj laŭ rekta metodo (28). „Nia Lernolibro" estas plejgrandparte uzata, sed ankaŭ oni uzas aliajn lernolibrojn. La rekta-metodaj kursoj estas plej grandparte gvidataj de eksterlandaj kdoj. Ni atentos la rezultojn el ambaŭ formoj de la kursgvidado (laŭkvante kaj -kvalite).
La sekcioj mem prizorgas la kursaranĝojn kaj la federacia estraro sekve ne povas influi, sed estas kompreneble, ke la grava flanko por la organizo havas nian atenton kaj ke la sekcioj povas kalkuli pri la kunhelpo de la fed.-estraro en okazoj, kiam traktas pri la organizaj aranĝoj.
En la daŭrigaj kursoj diversspecaj instruiloj estas uzataj, sed kun ĝojo ni povas konstati, ke la eldonaĵoj de nia federacio kun sukceso trovis sian lokon kaj multflanke estas utiligataj.
Pri la infankursoj ni ankoraŭ ne havas plenan superrigardon, sed ni atentas ĉi flankon. Ni klopodas por ke ankaŭ la fruktoj el la infankursoj venu al nia organizo. Por tio ni starigis komitaton, kiu okupas sin pri tio.

## GAZETARSERVO.

Pro diversaj konsideroj ni, en ĉi tiu jaro, ne aperigis la komunikojn ĉiu-dekkvartage, sed laŭkonvene.
Entute aperis 10 bultenoj en ĉi tiu jaro kaj ni povas konstati per la statistiko, ke grava parto el la nederlanda gazetaro akceptis ilin. Ankaŭ ni konstatis, ke aliaj esp.-organizoj parte aŭ tute presigis la komunikojn en siaj organoj (plejofte sen mencio pri la fonto) evidente kun la celo, ke ankaŭ iliaj anoj utiligu la komunikojn.
Generale ni publikigis komunikojn, kiuj atestas pri progreso de esperanto kaj cetere resumajn raportojn pri nia Federacio, atendante, ke niaj perantoj laŭ niaj instigoj en L E. kaj en Interkontaktilo mem verku propagandcelajn artikoletojn. Daŭra apero de artikoletoj pri esperanto ja donas rezultojn, kiuj estas favoraj al nia movado.

## LA EKZAMENA AFERO.

Ankoraŭfoje ni devas raporti pri ĉi afero kaj evidente ne lastfoje. En la daŭro de jaroj niaj klopodoj efikis jene: la malnova neŭtrala komitato likvidiĝis; nova komitato estas stariĝita, konsistigata de LEEN kaj nia Federacio, en la kadro de la organiozj.
Al tiu ideo nur la de LEEN kaj FLE starigita komitato konformiĝas. La aliaj organizoj ne volis akcepti tiun bazon, kaj starigis tial apartan E K.
Per tio ili finfine konigis sian veran vizaĝon. La rolo de la sinjoroj gvidintaj en tiu afero montriĝos esti malnobla kaj al la esp.-afero malutila.
Pri niaj seriozaj kaj multjaraj klopodoj atestas impona mapo da korespondaĵoj kaj nerefutebla ĝia enhavo montras, ke ni honeste iris ĝustan vojon. Montriĝis, ke la aranĝo de la malnova komitato de LEEN-NK estis netaŭga kaj konfuzanta. Sed super ĉio montriĝis, ke en ĝi regis influoj, kiuj ĉiel klopodis eviti akcepton de nia Federacio en la komitato.

## PROPAGANDO.

Apud la kutima kaj daŭra propagando, ni en la pasinta jaro koncentrigis niajn fortojn en la t.n. „Verda Monato" per kiu ni faris la propagandon pli sisteme kaj pli konkrete.
Ni senskrupule povas raporti, ke ĉi tiu unua provo estis tiel valora, ke en la estonto ĝi sendube okupos gravan parton de nia propaganda agado. La spertoj jam montras sin diversflanke. En tiu propagando partoprenis ĉiuj niaj sekcioj kaj distriktoj. La klopodoj sin direktis al sukcesigo de tiu propagando. Estas vere, ke oni kelkloke plendis, ke nur „kelkaj" anoj devis fari ĉion, sed sendube la kelkaj en tiuj lokoj nun povas fieri pro tio kaj sendube ili hontigis la aliajn; estas vere, ke ankoraŭ ne ĉiuj niaj anoj aktive partoprenis, sed sendube la agemo de la laborantoj instigas la aliajn; estas vere ke ni ankoraŭ ne atingis plejaltgradan rezulton, sed la akirita sukceso donas al ni la konvinkon, ke ni kapablas atingi pli altan ŝtupon. Ĉu ni ripozu nun, kiam ni scias, ke ni suriris tiurilate ĝustan vojon? Ni faris nur la unuajn paŝojn, kiuj ja certigis nin, ke ni povas atingi pli. Sekve ni streĉu celkonscie niajn fortojn por la estonto kaj ne ripozu, sed jam nun prikonsideru eventualajn mankojn, erarojn, nekontentigajn aranĝojn kaj eventualan malatenton rilate al diversaj aferoj. Ni plibonigu, preparu, projektu, verku kaj laboru, por ke la spertoj de la pasinta jaro estu utiligataj por la nuna kaj estontaj jaroj.

## PROPAGANDA MATERIALO.

Ni eldonis:
Propagandan numeron LE (Sept.) 15000 ekz. (vendita).
Broŝuron „Wat ieder van Esp. weten moet" de kdo De Bruin 20.000 ekz. (vendiĝis 11.000).
Flugfolietojn 300.000 ekz. (venditaj).
Plue ni fabrikigis 100 flagojn (vendiĝis 50); bicikloflagetojn; ŝildetojn kaj krome vendis el provizo ankoraŭ 1800 muro- kaj fenestroafiŝojn (de kdo De Geest).

## PAROLANTOJ.

Kiel parolantojn ni trovis pretaj oratori en nia nomo:
Chr. W. J. v. d. Bilt, prez. Alg. Ned. Mijnwerkersbond (Sindikato de ministoj).
Cor. Coppens el Rotterdam.
W. Drees, lid der Tweede Kamer (Parlamentano).
J. Gregoor, prez. Ned. Bond v. Arb. Muziekverenigingen (Ligo por Lab. Muzik-societoj).
E. J. Jurgens, vicprez. Ned. Ver. v. Fabrieksarbeiders. (Sindikato de fabriklaboristoj).
N. Nathans, sekr. ITF. (Internacia Transportlaborista Federacio).
Dr. H. Polak, Parlamentano kaj prez. de Alg. Ned. Diamantbewerkersbond (Ned. Sindikato de Diamantistoj).
B. Ponstein, sekr. Alg. Ned. Typografenbond (Ned. Sindikato de Tipografistoj).
Swaters, komunuma konsilantarano de Gorkum.
Ĉi tio estis la rezulto de niaj tiurilataj klopodoj por speciale certigi nin pri kunhelpo de oratoroj por nia Verda Monato. Krome en la sekcioj kaj distriktoj estis diversaj ĝekdoj, kiuj prezentis sin por paroladi en la ekspozicioj kaj publikaj kunvenoj. Pri la unuaj klopodoj en tiu direkto ni povas esti iugrade kontentaj.
Ni havas la konvinkon, ke ni per tio ankaŭ havigis al ni moralan sukceson.
Antaŭ la VARA-mikrofono paroladis por nia Federacio kdo Faulhaber kaj unu el oratoroj ĉi supre nomitaj, nome kdo W. Drees (parlamentano).

## EKSPOZICIA MATERIALO.

Ankoraŭ neniam ni atingis tiel altan nombron da ekspozicioj kiel en la jaro 1934, kion ni dankas al la intensiva propagando sub la devizo „La verda monato." Entute ni okazigis 81 ekspoziciojn, parte per la federacia propaganda materialo, parte per tiu de la distriktoj kaj la sekcioj. Ĉi lasta fakto montras ĝojigan aktivecon de la sekcioj en la kolektado de Esperantaĵoj, al kiu ni donis instigon antaŭ 2 jaroj kaj kiun ni senĉese subtenas per sciigoj en L E kaj per cirkuleroj pri novaj Esperanto-eldonaĵoj senpage riceveblaj. Laŭdinde estas, ke la kreskanta intereso de la sekcioj pri ĉio, kion prezentas la Esperanto-merkato estas akompanata de la deziro trovi ĉiam pli bonan aranĝon de la ekspoziciaĵoj. Kiel tiaj servis al ni pasintjare ne nur diversaj ĉambroj kaj haloj, sed ankaŭ butikoj en trafikplenaj stratoj aŭ nur elmontraj fenestraj kaj eĉ tendoj.
Lertaj manoj de kelkaj membroj zorgis pri la propagandaj tukoj, bildoj, mondkartoj kun korespondaĵoj, lumefektoj, kanto, muziko kaj pluraj alogiloj por la publiko. Aliaj prizorgis la internan flankon, ĉiu dediĉis sin laŭ kapablo fervore al sia tasko. La Federacia propaganda materialo konsistas nun el 6 kompletaj ekspozicioj, el kiuj 5 servas por Nederlando, 1 por Belgio. Per tiu ĉi nova aranĝo ni evitis ĝis nun pagitan altan transliman ekspedkoston. En Belgio ni aranĝis kun bona sukceso ekspozicion en Gent (Aprilo), Brugge (Aŭgusto) kaj en Popoldomo de Antwerpen (Novembro).
La materialo estas regule reviziita kaj per freŝdataj gazetoj kaj novaj eldonoj provizita.
Pliriĉigita ĝi estis per bildoj de Dro. Zamenhof, novaj pentritaj propagandaj afiŝoj kaj serioj da oficialaj poŝtkartoj el Brazilo, Hungario kaj Liechtenstein. Kdo Slavenburg el Apeldoorn donacis 10 ekz. de sia kartludo, nome 5 ekz. surkartonajn kaj 5 en ujoj.

## VOJAĜANTAJ BIBLIOTEKOJ.

Same kiel en la antaŭa jaro ankaŭ en 1934 la libroj de la vojaĝantaj bibliotekoj estis multe legataj. La Fed. bibliotekoj estis la tutan jaron en la posedo de la sekcioj. Kelkaj sekcioj eĉ tiel alte taksis la valoron kaj utilon, ke ili ofte petis plilongigon de la tempdauro por ebligi, ke la membroj trankville povis finlegi kaj pristudi la librojn.
La bibliotekoj estis pruntataj de jenaj sekcioj: Alblasserdam, Alkmaar, Bilthoven, Delft, Dordrecht, Krimpen aan de Lek, Leiden, Noord-Beemster, Utrecht kaj Zeist.
Estas agrable konstati, ke niaj membroj singarde traktas la librojn, por ke ili ne malpuriĝu aŭ difektiĝu.
Nur unu sekcio konsilis al ni elpreni kelkajn librojn, pri kiuj laŭdire la membroj ne interesiĝus. Ni estas sufiĉe sentemaj por bonaj konsiloj kaj certe esploros la eblon anstataŭigi ilin per aliaj. De diversaj flankoj la redaktoro de L E ankaŭ ĉi jare ricevis librojn por recenzi. **Ĉiuj por recenzo ricevitaj libroj venas en la Fed. Biblioteko.** Ni pro tio esperas baldaŭ pretigi kaj disponigi la sesan „Vojaĝanton".
Kvankam ni ne volonte plendas, ni tamen

ĉi loke menciu, ke ni spertis malagrablan fakton kiu iu sekcio, kiu devigis nun skribi eĉ kvin leterojn antaŭ ol ni sukcesis liberigi bibliotekon, kiu jam estis pli ol jaro en la posedo de tiu sekcio! Tio kostis monon kaj superfluan penon, kio certe povis esti evitata. Ni tamen esperas, ke ni estonte ne plu spertos tiajn malhelpaĵojn. Kiam la prizorgantoj bone atentos la resenddaton aŭ, se necese, sufiĉe frue petos plilongigon, tiam la aferoj bone kaj preskaŭ aŭtomate marŝos. Tiel estu!

**RADIO-DISAŬDIGO.**

Ni en 1934 daŭrigis la klopodojn por interkonsenti kun la VARA, por ke okazu regulaj disaŭdigoj kun variaj programoj, precipe enkonduko de esperantlingvaj komunikoj, paroladetoj, ktp. kaj cetere, konvenokaze, propagandcelaj disaŭdigoj. Niaj tiurilataj klopodoj restis fakte vanaj, escepte en la pasinta jaro la 2 disaŭdigoj en la Verda Monato (vidu la raporton pri „parolantoj"). En la fino de la jaro VARA invitis nin al interpriparolo por efektivigi regulan disaŭdigon.
Ni faris projekton, kiu planis regulan dusemajnan disaŭdigon duonhoran. La programoj estus variaj (kun muziko, teatraĵetoj ktp ĉar ni povus kalkuli pri efektiva kunlaboro flanke de la VARA.) Tiujn planojn ni devis ŝanĝi, kiam ni ricevis la informon, ke ni povos disponi pri ĉiudusemajne 20 minutoj provizore dum la unua duonjaro de 1935.

**INFANGAZETO „LA VOJO".**

Pli kaj pli ni sentis la mankon de iu liganta formo por la porinfanaj kursoj kaj tiuj infanoj, kiuj finis kurson. De diversaj flankoj oni petis informojn, kiel forigi tion kaj estis konsiderata, ĉu la porinfanaj kursoj fakte nun donas la deziratajn fruktojn. Montriĝis ke ĝenerale oni povas diri, ke plej grandparte la penoj por atingi ion estis vanaj. La kursoj finiĝis, ne estis io, kio ligis la infanojn al esperanto kaj al tio, kion ili fakte atendas pro la instruado.
Infanoj estas tre facile allogitaj de io, sed ankaŭ tre baldaŭ forgesas ĝin kaj ne plu pensas pri ĝi. En niaj kursoj ni konstatis la malon de tio, kion oni ĝenerale certigas, nome ke infanoj pli facile lernus ol plenaĝuloj. La rezultoj en la kursoj por plenaĝuloj montras, ke en la nuna okazo la volo, la idealo superas la inklinan povon de la infanoj. La rezultoj (komparante) estas tre malfavoraj por la infanoj. Ni povas diri, ke kun kelkaj esceptoj, preskaŭ la tuta laboro, farita por la infanoj en nia movado, estis vana.
Estas kompreneble, ke ankaŭ tiu flanko havis kaj havas nian atenton. Tial ni prikonsideris tiun flankon kun la rezulto, ke stariĝis komitato, kiu unue havas la taskon prizorgi la eldonadon de porinfana gazeto. (Ĉar pri la stariĝo de tiu komitato en L E aperis pluraj detalaj informoj, ne necesas ankoraŭfoje priskribi tion.)
Aperis nia porinfana gazeto „La Vojo" kun la celo interesigi la infanojn pri esperanto kaj doni al ili direktojn por utiligi sian povon kaj scion kaj cetere klopodi atingi, ke estiĝas ia organiza formo en kiu la infanoj trovas lokon, por ke ili ne perdiĝu por nia afero kaj ke iliaj penoj ne estu senfruktaj.
Koncize ni raportu ion pri la senca enhavo de „La Vojo" por atingi tiun celon. Per enkonduka holandlingva artikoleto, kun intima karaktero, la infanoj estu instigataj al iu laboro en la kadroj de la kursoj kaj grupoj. Instigi, informi kaj se necese interpreti por okazigi renkontiĝojn.
Per aldono de esperanto-kurso servi al la instruado tiel individua, kiel por la kursoj. Esperantlingvaj artikoloj, rakontoj, ktp. kun, precipe por infanoj interesa, enhavo laŭ temo kaj spirito eduka kaj instrua.
Holandlingva rubriko en kiu okazas interŝanĝoj de spertoj rilate al korespondado, tiel instigante al regula korespondado.
Krome tiu rubriko estas instiga al interesiĝantoj, kiu neplene aŭ tute ne ankoraŭ scipovas esperanton. Plue esperant-lingva rubriko „interkorespondado" per kiu la redaktorino respondas al la leteroj, kiujn ŝi ricevis de la infanoj. Kaj cetere anekdotoj, enigmoj, ktp. esperantlingvaj.
Ĉar provizore ne eblis eldoni ĝin presitan, ni povis aranĝi la aferon tiel, ke ĝi aperas ciklostilita. La eldonkvanto estas 200 kaj en la fino de la jaro ĝi nombris 100 abonantojn. Sendube ankoraŭ ne granda kvanto, sed konsiderante, ke ĝi unuflanke estas malhelpata, kiel oni povas legi en la tiurilataj informoj aperintaj en L E, kaj aliflanke ke la nombro de la esperantistaj infanoj ankoraŭ estas nur kelkcenta (enkalkulitaj la diversaj daŭrigaj kursoj) ni povas esti kontentaj, ankaŭ ĉar ni povis konstati, ke la aliĝo de novaj abonantoj daŭras seninterrompe. Ni estas konvinkitaj, ke „La Vojo" siatempe okupos gravan lokon en niaj porinfanaj aranĝoj.
Kiel komitatanoj funkcias kdino L. Tillema-Heynen, kiel redaktorino kaj gekdoj Smit, kiuj prizorgas la administradon. La ciklostiladon prizorgas gekdoj Smit, kiuj disponas pri la iloj, parte propra posedaĵo. Ni tamen konsideras, ke ĝi baldaŭ povu aperi presita. Gekdoj Veenendaal, kiuj estis invititaj por partopreni en la komitato, pro memstara agado, pri kiu nek la fed.-estraro nek la alia komitatanino povis konsenti, eksiĝis el tiu komitato. Gekdoj Smit el Groningen, laŭ peto de fed.-estraro, anstataŭis ilin.

**LA PROGRESANTO.**

Nova grava eldono unuafoje vidis la sunbrilon en la jaro 1934, nome la studorgano „La Progresanto".
La nomo jam esprimas la sencon, ke ĝi servu al la progresantoj. Ĝi enhavas studmaterialon por la progresantaj esperantistoj. Fakte ĝi estas la rezulto de.... malsukcesintaj klopodoj. Laŭ la intencoj devus esti starigita komitato por prizorgi la funkciadon de skriba kurso. Post multaj konsideroj, aranĝoj kaj projektoj ni konkludis, ke ni povas atingi tion per eldono de studorgano en kiu troviĝas materialo, kiu povas servi al nia anaro kun diverspecaj kapabloj rilate al la lingva flanko.
En ĝia enhavo ni trovas materialon por la studado por A.-diplomo kaj por B-diplomo, sed samtempe ĝi povas esti utila al ĉiuj, kiuj serioze studas nian lingvon.
La redakcian komitaton formas kdoj Faulhaber, Krijt kaj Kruit dum kunlaboras kdoj De Bruin, Degenkamp kaj Velthove.
Kiel studorgano, ĝi sendube jam trovis lokon en la sekciaj aranĝoj, al kiuj ĝi bonege povas utili. La nombro de la abonantoj superis en la fino de la jaro 1200. Ĉar tamen tiu nombro ankoraŭ ne sufiĉas por kovri la elspezojn, ni esperas, ke aliĝo de novaj abonantoj forigos la deficiton.

**NIA ORGANO KAJ SENNACIULO.**

Nia gazeto, „Laborista Esperantisto", aperis en la pasinta jaro regule, ĉiumonate en la konata formo.
Kun la monata gazeto Sennaciulo, kiun ĉiuj niaj membroj senpage ricevis, la anoj de nia Federacio do 2 foje monate estas informitaj pri la en- kaj eksterlandaj movadoj kaj okazaĵoj.
L E nombris 110 paĝojn kaj S-ulo 96, do entute la anoj ricevis 206 paĝojn da legaĵo. Iom pli ol en 1933.
La eldonkvanto kreskis ĝis **4600** kaj ni kredas, ke tio estas la plej granda eldonkvanto atingita de „nacia" esp.-gazeto. Tio fariĝis ebla pro la fakto, ke **1100** kursanoj abonis nian gazeton L E.
Tio estas profitdona por la sekcioj kaj nia Federacio, ĉar jam nun estas informitaj la kursanoj pri nia organizo kaj nia movado, despli ĉar L E estas plejparte redaktata en la nederlanda lingvo.
Propagandcele tio ja estas necesa. Esperantan legaĵon niaj anoj jam ricevis per S-ulo. Ni esperas, ke niaj membroj tiun lastan ankaŭ utiligu por plibonigi sian esperanto-konon. La aranĝo estas tre kontentiga kaj ni spertis de multaj flankoj, ke la Fed.-anoj ĝenerale tre ŝatas ĝin.
El L E malaperis la lingvopaĝoj redaktitaj de kdoj Degenkamp kaj Faulhaber. Ne pro manko de intereso, sed ĉar aperis speciala studorgano de la Fed., kiu havas pli ol 1200 abonantojn kaj aliaj studeldonaĵoj. Tial ni opiniis pli ĝusta, ke nur de tempo al tempo aperu iu speciala traktaĵo pri gramatikaj aferoj.
Specialajn aŭ interesajn artikolojn la redaktoro preskaŭ ne ricevis.
Cetere la redaktoro prizorgis la rubrikojn de la Fed. kaj zorgis por la alia enhavo, same, pro la daŭra kontakto inter la Fed. estraranoj, li ĝvidis la necesan diskutadon en L E pri organizaj aferoj.
Recenzojn prizorgis kdino Faulhaber kaj kdo Th. Buis; statistikon pri la gazetaro kdino Oudenhooven-Bishoff.
Kelkaj ensenditaĵoj ne povis aperi, sed la Gazeta Konfliktkomitato ne bezonis funkcii. Pro la kresko de la Fed. la distriktaj kaj sekciaj rubrikoj ofte fariĝis tro ampleksaj malgraŭ necesaj mallongigoj.
Kvankam ni regule havas sufiĉe da materialo taŭga por nia gazeto, ni pro spacmanko ne povis enpresigi ĉion. Pro la altaj kostoj, ni nur kelkfoje povis aldoni ekstrajn paĝojn.

**LIBRO-SERVO.**

La Libro-Servo en nova hejmo, tio montras, ke ĝi havas vivokapablon, ĉar same kiel kreskanta homo bezonas aliajn vestojn ankaŭ nia kreskanta L S bezonis novan veston. Ĝi nun trovis lokon en aparte luitaj ĉambroj. Ankaŭ tie la sekretarieja materialo trovis lokon.
Ne plu eblis trovi lokon aŭ loketon necesan por la L S laŭ la antaŭa aranĝo, nome ĉe gekdoj Koch hejme, ankaŭ pro la konsidero, ke gekdoj Koch transloĝiĝis kaj cetere ne eblas daŭra aranĝo laŭ tia amplekso kaj formo en privata hejmo. Tiu konsidero ankaŭ kaŭzis, ke ni kunigis la materialojn de la L S kaj de la sekretariejo en tiuj apartaj speciale por tiu celo luitaj ĉambroj kaj evidente ni jam baldaŭ denove estos devigitaj, ŝanĝi tion kaj se eble trovi pli oportunan lokon.
Ĉu ni povas mencii ion pliraportindan? Tio ja fakte skizas la staton de la L S nome, ĝi kreskas. Miloj da libroj en unu jaro estas ekspedataj kaj administrataj helpe de „propraj" homoj, inter kiuj gefratoj de nia estrarano Kroonder.
La financa raporto atestas pri progreso kaj kiam ni konsideras, ke la unuaj aranĝoj nur povis esti ĉiuflanke limigitaj pro manko de kapitalo, ni nun povas fieri pro la fakto, ke ni per streĉa laboro sukcesis certigi la regulan funkciadon de la L S. Ni ne disponis pri eĉ iom influa sumeto, nur pri laboremo kiam la L S faris la unuajn paŝojn; tamen ni sukcesis atingi, ke ĝi nun de diversaj flankoj estas konsiderata serioze kaj ni jam spertis, ke oni de diversaj flankoj turnis sin al nia L S ankaŭ instancoj, kiuj komence iom pli malpli ignoris ĝin kaj eĉ kontraŭstaris. Tio atestas, ke nia L S servas diversflanke kaj eĉ superas en la servado aliajn instancojn. Akurate kaj precize ĝi klopodas plenumi sian taskon kaj tie, kie aliaj fiaskis, nia L S sukcesplene plenumis sian taskon.
La eldonoj de nia federacio estas konataj en la esperanto-movado kaj senescepte sukcesis. Malgraŭ, ke ni kelkloke povus plendi, ke ni sendube povus havi ankoraŭ pli da sukceso, ne nur por ni sed ankaŭ por la movado ĝenerale, ke kelkaj niaj konjektoj por la eldonoj superis la akiritan nivelon; ekz. laŭ ni ne sufiĉis la vendado de flagoj, flagetoj, ĝeneralaj propagandaĵoj kiel pingloj, ŝildetoj, ktp. murafiŝoj, bro-

ŝuroj, kaj cetere, ke oni eble per pli intensiva kaj sistema aranĝoj en kelkaj sekcioj sendube povas akiri pli da sukceso rilate al la vendado de libroj, ktp.
Ni tamen kun ĝojo povas konstati, ke nia L S estas konsiderata kiel grava kaj ke ĝi montras aktivecon, kiu enhavas promeson por nia movado. Por la estonto ni povas esti certaj, ke per ĝi nia federacio kaj sekve la esperanto-movado ĝenerale povas havigi al si la fruktojn de kuna kaj streĉa laboro. Tio ne eblus, se ni ne trovus en niaj sekcioj la subtenon necesan por atingi tion. Ni kalkulas pri tio ankaŭ en la estonto kaj eĉ pli, ke oni esploru la eblojn por utiligi nian L S en propraj regionoj favore al nia komuna afero.

**ELDONAĴOJ.**

En 1934 la Federacio denove zorgis pri kelkaj eldonaĵoj. La plej grava estas la studverko de kdo F. Faulhaber „Tra la Labirinto de la esp. gramatiko" en kvanto de 1000 ekz.
En nur unu jaro ĝi preskaŭ elvendiĝis. Baldaŭ dua eldono venos. Sekvis la eldono de la parolado en la Antverpena kongreso de kdo Lanti „Absolutismo" kiel broŝuro en kunlaboro kun SAT.
En la „verda monato" ni represigis la konatan broŝuron de kdo G. P. de Bruin „Wat ieder van esp. weten moet" en 10.000 ekz. Cetere nia L S prizorgis la eldonadon kaj fabrikadon de flugfolieotj, flagoj, prop-markoj, pordoŝildetoj, krajonoj ktp.

**SAT.**

Pri SAT ni povas raporti, ke la interrilatoj estis daŭraj kaj kontentigaj. Ne ŝanĝiĝis io en la pasinta jaro. Niaj anoj ricevas regule S-ulon, per kiu ili estas ligataj al la internacia movado. Pli kaj pli montriĝis, ke la direkto elektita de la Federacio ĉirilate estas ĝusta katj konforma al la ideala strukturformiĝo, kiun esperanto ebligas kiel mondlingvo.
Kiel eduka kaj kultura organizo SAT prezentas mondskalan eblon de konscia evoluado al la laboristaro, sendepende de la naciaj kadroj, kiel mond-organizo de laboristaj esperantistoj, kiuj povas adeptiĝi laŭ sennacieca karaktero.
Ni ĉiam trovis subtenon de SAT kiam ni turnis nin al ĝi rilate organizajn aranĝojn, same kiel ni daŭre klopodis servi al SAT favore al nia komuna laborterено.
Kiel ĝenerala konsilantarano reprezentanta la Federacion funkciis kdo Alings. En la SAT-kongreso kdo J. v. Scheepen reprezentis (proprakoste) nian Federacion.

**INTERKONTAKTILO.**

Interkontaktilo en la pasinta jaro aperis 5 foje kun diversaj internaj komunikoj al niaj funkciuloj, distriktaj kaj sekciaj estraroj. Ĝi aperas ciklostilita en kvanto de 500 ekz. La tuta prizorgo estas de la sekretariejo.

**NIA KONGRESO.**

La partopreno al niaj kongresoj daŭre estas pliintensiva. La antaŭan jaron en Amsterdam ĉeestis 500 partoprenantoj la kongreson; en Antwerpen, kie en la pasinta jaro okazis nia 19a kongreso, ĉeestis, malgraŭ la longa distanco, 550 anoj. Estas ĝojiga fakto la konstato, ke niaj anoj ĉiel klopodis ĉeesti la kongreson kaj de ĉi tiu loko ni honorcele memorigas tiujn, kiuj spite ĉion, venkante ĉiajn malhelpaĵojn klopodis viziti nian kongreson, tiel montrante sian intereson por sia organizo. Sendube multaj senlaboraj anoj kaj anoj, kiuj pro la nuna krizo devas konsideri la elspezon de ĉiu cendo oferis gradkompare multon. Jam antaŭe prikalkulinte ĉion, ŝparante kaj preparante ili sukcesigis, ke ili povis ĉeesti la kongreson, ili venis eĉ per bicikloj riskante malpermesatan translimiĝon kaj biciklante tutan nokton seninterrompe.
Ĉu ni pli klare, pli konkrete povas skizi la sindonon de niaj anoj, la idealon, kiu regas en nia movado? Ne eblas. Sed sendube ĉiuj niaj anoj povas fieri pro la fakto, ke en nia movado tio sin manifestas. Estas apoĝilo por ĉiuj niaj laborantoj, kiuj senlace streĉis siajn fortojn por nia organizo.
La kongreson mem ni povas nomi sukcesa. La intereso, kiu reĝis dum la tuta kongreso sendube alportis kaj alportos fruktojn. Ne nur laŭ internaj konsideroj la kongreso estis sukcesa, sed ankaŭ laŭ propaganda vidpunkto. Estis la unua fojo, ke nia kongreso oficiale estas akceptita de komunuma estraro.
La multa laboro, kiun niaj antverpenaj ĝekdoj faris por sukcesigi nian kongreson sendube ne estas senfrukta. Kiel fino de la kongreso la partoprenintoj ĝuis ekskurson tra la Schelde (Sĥelde) prezentita de la urbo-estraro.
Kiel loko por la proksima kongreso estis elektita Bussum. Pro diversaj konsideroj, kiuj ankaŭ estis priparolitaj en la Fed. Konsilantaro, en interkonsento kun la sekcio Bussum, ni tamen ŝanĝis tion kaj interkonsente kun la sekcio Groningen decidis, ke la proksima kongreso okazos en norda parto de Nederlando, en Groningen.

**KANTARO.**

Laŭ kongresa decido ni okupis nin pri eldono de kantaro. Laŭ invito de fed.-estraro kdoj Krijt, Rijpstra kaj v. Scheepen konsistigis komitaton por plenumi tiun taskon. En la fino de la jaro la kolektita materialo statis tiel, ke ĝi preskaŭ estas presigpreta.

**TEATRAĴOJ.**

Ni ricevis teatraĵojn de kdo Bas Wels „Naciismo" kaj „Du Vojoj" ambaŭ esperantlingvaj; de kdino C. de Cock „Hoe Esperanto zich wreekt", flandra-(holand)lingva; de Nekonato „Senlabora", esperant-lingva; kaj de kdo Barbiers „Mi estas vi kaj vi estas mi" (sprita) esperantlingva, kaj konsideras eventualan eldonon.

**LERNOLIBRO POR KOMERCA KORESPONDADO.**

De kdo J. v. Scheepen ni ricevis manuskripton de lernolibro por komerca korespondado. La manuskripto ankoraŭ estas pristudita por konsideri — se eble — eldonon.

**SEKRETARIEJO.**

En la sekretariejo envenis 2587 korespondaĵoj kaj 461 presaĵoj; ekspeditaj estis 1505 korespondaĵoj kaj 3176 presaĵoj. (La ekspeditaĵoj de la Gaz. Servo estas enkalkulitaj).
En la ekspozicio-fako ni ricevis 680 poŝtaĵojn kaj ekspedis 767. La Administracio forsendis 232 leterojn ktp kaj 1210 div. poŝtaĵojn. La red. de L E ricevis 468 leterojn ktp kaj ĉ 500 eksterlandajn gazetojn. Li ekspedis 396 div. poŝtaĵojn kaj ĉ 900 L E interŝanĝe.

**„WAT IS EN WAT DOET DE FEDERATIE?"**

De ĉi tiu informcela cirkulero ni denove ciklostilis 1000 ekz., el kiu kvanto ni dividis inter niaj distriktaj estraroj por servi en okazo de neceso. Cetere ni sendis ekz. al ĉiuj niaj sekcioj. Tiu nova eldono estis kompreneble kompletigita per la plej novaj aranĝoj kaj ŝanĝoj.

**CIKLOSTILADO.**

Ĉio rilate la ciklostiladon estas de ni mem farita. Por tio la fed.-estraro disponas pri manciklostilo. Ĉi lasta utilas por Interkontaktilo, Gazetarservo kaj cetere por la diversspecaj cirkuleroj.
Faritaj estas 40 stenciloj kaj ciklostilitaj 15.000 folioj.

**NIAJ KUNHELPANTOJ.**

Se temas pri laboro en nia movado ne eblas konigi ĉiujn nomojn de niaj kunhelpantoj, kiuj grave subtenas nin en niaj laboroj por nia komuna afero.
Sed estu konvinkita, ke por nia movado pli estu konvinkita, ke por nia movado pri valoras unu nekonata kunhelpanto ol aro da kritikemuloj, kiuj opinias, ke ili per tio estas plej utilaj al la Federacio, nur kritikas la laboron de aliaj kaj neniam povas montri propran laboraĵon kiel modelon. Estas konstatinda fakto en nia movado, ke niaj kunlaborantoj, tiel konataj kiel nekonataj laŭnome, sukcesigis, ke tiuj kritikemuloj pli kaj pli silentis, tiel ke ni ne bezonis foruzi tiom da tempo kaj tiom de nia povo nur por konstraŭstari la malbonajn influojn de tiaj kritikoj, kiaj antaŭe oftiĝis.
Al ĉiuj niaj nekonataj kaj konataj kunlaborantoj nian dankon kaj honoron.
Rilate al la kunhelpo rekte por la federaciestraraj laboroj ni tamen volas raporti pri tiuj, kiuj regule kunlaboras. Nome:
por la Gazetar-Servo ĝekdoj Oudenhooven-Bishoff, kiuj prizorgas la ekspedon kaj statistikon kaj krome prizorgas la radio-rubrikon en Radiogids;
por Libro-Servo, kdo Kroonder (neesperantisto, frato de nia estrarano), kiu regule helpas en la Libro-Servo;
por la ekspedo de L E kaj L P kdo Pach, kiu ricevas pro tio tre modestan rekompencon, ĉar estas grava kaj fakte profesia laboro;
por la adresaro de „La Progresanto" ĝek-doj Rademaker, kiuj kun la helpo de kelkaj anoj el sekcio A'dam XIII prizorgas ankaŭ la skribadon por la adresoj sur la kovertoj;
por la ekspedo de interŝanĝnumeroj L E, kdo Schatz;
por la recenzo de libroj, kdo Buis;
por la prizorgo de ŝlipa vortaro; kdo Kruit.
Escepte unu, neniu ricevas ian rekompencon kaj ĉiuj faris sian laboron sindone por nia Federacio.

**LA ESTRARO.**

La estraro konsistis el kdoj Faulhaber prez.; De Lange, vic-prez.; Veen, sekr.; Prent, 2a sekr.; Koch, kasisto; Kroonder, 2a kasisto. Alings redaktoro kaj kdino Faulhaber asesorino.
La taskoj ĉefe jene estis dividitaj:
Kdo Faulhaber krom la prez. tasko okupis sin pri la instruado, li estis ano de la E.K., redaktoro de „Ons Taalblad" (kun kdo Degenkamp) redaktoro de „La Progresanto". Lia edzino prizorgis la ekspoziciajn materialojn.
Kdo De Lange prizorgis la vojaĝantajn bibliotekojn, la membro-administradon (en la membrolistoj estis krom la al- kaj eksiĝoj notitaj *670 adresŝanĝoj*); kontroladon de la kvaronjaraj membrolistoj, kaj interrilatis, por la konformaj notoj koncerne ekspedon de S-ulo, kun SAT.
Kdo Veen okupis sin krom pri la sekretariejaj laboroj pri la Gazetarservo kaj Interkontaktilo.
Kdo Prent okupis sin pri la adresaro (stenciletoj), prizorgis la stenciladon kaj ciklostiladon kaj kunhelpis laŭkonvene en la Libro-Servo, en kies ejo li regule laboras por ĉio ĉi, krome li prizorgis la adresigon por ekspedo de L E.
Kdo Koch okupis sin pri la financoj.
Kdo Kroonder prizorgis la Libro-Servon, kiu nun trovis lokon en apartaj ĉambroj.
Kdo Alings okupis sin pri la redaktado de L E. Krome li korektis ĉiujn niajn eldonaĵojn. Li reprezentas la Federacion kiel ĝen. konsilantaranon en SAT.
La estraranoj regule helpis unu la alian en la diversaj laboroj. Ĉiuj sufiĉe gravaj korespondaĵoj, raportoj, komunikoj, projektoj ktp, ktp. regule rondiras ĉe la estraranoj, kiuj ekster la estrarkunsidoj havas daŭran kontakton persone kaj letere.
Okazis entute 23 estrar-kunvenoj, 2 konsilantaraj kunvenoj kaj la kongreso. Krome diversaj estraranoj partoprenis dekon da konferencoj kaj paroladis en kunvenoj.

Sekretario

# Kasraporto de 1 Jan. '34 ĝis 31 Dec. '34.

*Enspezoj.*

| | | |
|---|---|---|
| | Saldo 1 Jan. 1934 | f 10.84 |
| 1 | Kotizo sekcioj | - 4924.93 |
| 2 | „ ĝen. membroj | - 145.— |
| 3 | „ simp. membroj | - 18.30 |
| 4 | „ simp. organizoj | - 92.50 |
| 5 | Abonoj „Lab. Esp." | - 309.87 |
| 6 | Venditaj numeroj „Lab. Esp." Vidu: Ĝen. Rimarkoj. | - 6.20 |
| 7 | Anoncoj „Lab. Esp." | - 12.25 |
| 8 | Ricevitaj enirbiletoj kaj komunaj vizoj kongreso Antwerpen | - 102.49 |
| 9 | Rericevita vojaĝmono delegitoj kongreso en Antwerpen | - 98.76 |
| 10 | Rericevis de SAT-peranto | - 35.41 |
| 11 | Rericevis por la Fed. flago | - 20.— |
| 12 | Repago de sekcio Rotterdam V | - 10.— |
| 13 | Profito Libro-Servo | - 1500.— |

**RIMARKOJ ĈE.**

[1]) Sekcioj ŝuldas kotizon f 420.— (Ŝuldo 31-12-'33 estis f 598.98).

[11]) A'dam II, prunte posedante la kapitalon f 80.— por la Fed.-flago, repagis f 20.—.

[12]) vidu 37.

[14]) Ni pagis en 1934 .... f 2501.70
Ni ŝuldas L E Dec. .. - 252.63
f 2754.33
Pagita ŝuldo 1933 .. - 589.—
L E kostis precize .. f 2165.33

[16]) Ŝuldo Sennaciulo Dec. '34 .... f 160.—

[22]) Salonluo ............ f 70.—
komunaj vizoj vidu 8 - 46.24
vojaĝkostoj estraro .. - 30.40
restado ktp 3 tagoj .. - 106.33
diversoj ............ - 18.15
f 271.12

[27] + [28]) Krome por senpaga materialo de L S al Distr. N.- kaj Z. Holando, sekcioj Hoorn, Merksem entute f 12.50.

[31]) por estrarkunvenoj kaj ĉar la 2a sekretario plenumas sian taskon regule en la malproksima ejo de la L S.

(**Ĝenerala rimarko.** En- kaj elspezoj por propagando troviĝas en la raportoj de la Libro-Servo).

f 7286.55

*Elspezoj.*

| | | | |
|---|---|---|---|
| 14 | Preskostoj „Lab. Esp." | | f 2501.70 |
| 15 | Sendkostoj „Lab. Esp.": | | |
| | afranko | f 374.02 | |
| | ekspedkostoj | - 90.— | |
| | banderoloj | - 65.— | |
| | adresplatetoj | - 57.37 | |
| | | | - 586.39 |
| 16 | Sennaciulo | | - 1901.50 |
| 17 | Kliŝoj „Lab. Esp." | | - 18.50 |
| 18 | Preskostoj Skriba kurso (resto) | | - 110.— |
| 19 | Afranko por korespondado, propagando, Interkontaktilo, gazetarservo ktp. | | - 372.31 |
| 20 | Afranko sekretariejo en Belgio | | - 24.85 |
| 21 | Konsilantaro-kunvenoj (Aprilo-Aŭgusto) salonluo, kafo, ktp. | f 20.— | |
| | vojaĝmono delegitoj | - 169.27 | |
| | | | - 189.27 |
| 22 | Kongreskostoj Antwerpen | | - 271.12 |
| 23 | Vojaĝkostoj kongreso Antwerpen sekcio-delegitoj | | - 107.03 |
| 24 | Preskostoj enirkartoj kongreso Antwerpen | | - 13.52 |
| 25 | Diversaj vojaĝkostoj estraranoj | | - 35.34 |
| 26 | Kostoj sekretariejo | | - 19.50 |
| 27 | Subvencio Prov. Distr. (Gelderland-Groningen, Friesland) | | - 72.50 |
| 28 | Subvencio sekcioj (A'dam II, Enschede, Gorinchem, Den Haag IV, Stadskanaal) | | - 65.30 |
| 29 | Subvencio Radio Servo | | - 7.44 |
| 30 | „ Nosobe | | - 15.— |
| 31 | Tramkostoj estr. kunvenoj ktp. | | - 67.16 |
| 32 | Donacoj (pers.presejo kaj aliaj) | | - 27.— |
| 33 | Kontoraj bezonaĵoj | | - 154.53 |
| 34 | Biblioteko kaj eksp. materialoj | | - 18.86 |
| 35 | Gazetarservo, Interkontaktilo | | - 98.45 |
| 36 | Provizoraj elspezoj por la infangazeto „La Vojo" | | - 10.— |
| 37 | Prunto al sekcio Rotterdam V | | - 30.— |
| 38 | Kostoj esplorkom. Haga afero | | - 4.89 |
| | Saldo | | - 564.39 |
| | | | f 7286.55 |

# Bilanco 31 Dec. '34 „La Progresanto".

| | | |
|---|---|---|
| 1 | Abonantoj, kiuj pagis ĝis 31 Dec. 1934 | f 1126.65 |
| 2 | Abonantoj, ricevotaj | - 300.— |
| 3 | Deficito | - 221.95 |
| | | f 1648.60 |

| | | |
|---|---|---|
| 4 | Preskostoj (pagitaj) | f 229.50 |
| 5 | Preskostoj (pagotaj) | - 1050.— |
| 6 | Ekspedkostoj | - 15.— |
| 7 | Afranko | - 36.74 |
| 8 | Kontoraj bezonaĵoj | - 3.50 |
| 9 | Kovertoj | - 63.86 |
| 10 | Ekspedkostoj, afranko, kovertoj pagotaj | - 250.— |
| | | f 1648.60 |

# Jarraporto Libro-Servo 1934.

## BILANCO 31 DEC. 1934.

| | | | |
|---|---|---|---|
| Kaso | f 1870.14 | SAT (Plena Vortaro) | f 1225.— |
| Debitoroj (ricevota) | - 2190.95 | Kreditoroj (pagota) | - 443.55 |
| Libroj ktp (provizo) | - 3850.89 | Kapitalo: | |
| | | 31-12-1933 f 3616.98 | |
| | | Profitsaldo - 2626.45 | |
| | | | - 6243.43 |
| | f 7911.98 | | f 7911.98 |

## REZULTATKONTO.

| | | | |
|---|---|---|---|
| Ĝeneralaj Elspezoj | f 1325.53 | Profito Librovendado | f 5409.98 |
| Por la Federacio-Kaso .. f 1500.— | | Anoncoj Katalogo | - 42.— |
| Profitsaldo - 2626.45 | | | |
| | - 4126.45 | | |
| | f 5451.98 | | f 5451.98 |

## LIBROJ.

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1-1-1934 Komencprovizo | f 2043.— | Vendado | f 15499.18 |
| Aĉetado | - 11807.09 | 31-12-1934 Finprovizo | |
| Profito 31-12-1934 | - 5409.98 | propraj eldonoj f 2583.97 | |
| | | fremdaj - 1266.92 | |
| | | | - 3850.92 |
| | f 19350.07 | | f 19350.07 |

## KASO.

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1-1-1934 saldo | f 2030.25 | Repagis al Fed. kaso | f 359.97 |
| Ricevis por Fed. kaso | - 359.97 | Elspezoj (afranko ktp) | - 629.38 |
| Debitoroj (libropagoj) | - 14125.67 | Profitparto por Federacio | - 1500.— |
| Anoncoj en katalogo | - 42.— | Kreditoroj | - 11502.25 |
| | | Luo oficejo ktp | - 210.— |
| | | Reklamo (katalogo) | - 308.72 |
| | | Instal-kostoj | - 73.84 |
| | | Kontoraj bezonaĵoj | - 93.59 |
| | | Anonco kongreslibro LEEN | - 10.— |
| | | Saldo je 31-12-1934 | - 1870.89 |
| | f 16557.89 | | f 16557.89 |

## DEBITOROJ.

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1-1-1934 Ricevota | f 1427.86 | Ni ricevis antaŭpage | f 610.72 |
| Ni liveris dum 1934 por | - 15499.18 | Dum jaro ni ricevis | - 14125.67 |
| | | Pagota al ni je 31-12-'34 | - 2190.95 |
| | f 16927.04 | | f 16927.04 |

## KREDITOROJ.

| | | | |
|---|---|---|---|
| Ni antaŭpagis | f 865.33 | Pagota je 1-1-1934 | f 2139.04 |
